

KATALUNA ESPERANTISTO*

*Llengua internacional i drets lingüístics

NUMERO 350 (116)
KVINA EPOKO
APRILIO-JUNIO 2009

- **Printempo en Barcelono**
 - **Duobla sukceso en Majorko**
 - **Araba klaso en CES**
 - **Nord-katalunaj biografioj**
 - **Filmo pri Amades subtitolita en esperanto**
 - **Alternativa foiro en Valencio**
-
- **L'artificialitat de les llengües: estandardització i planificació**

ESPERANTO*
CAT

*Asociació Catalana d'Esperantoc
Kataluna Esperanto-Asocio

LLENGUA I POESIA

Els dies 3 i 4 de juny s'ha celebrat al Teatre Principal una nova edició, l'onzena, del Festival de Poesia de la Mediterrània. Catorze poetes de distintes llengües i països han participat, el dia 4, en la Nit de la Poesia. Els poetes s'han expressat en deu llengües: anglès, castellà, català, danès, eslovè, esperanto, gallec, hongarès, italià i maltès, tot representant cultures pertanyents a comunitats que, al marge del major o menor nombre de parlants, estan ubicades en espais geogràfics fàcilment trobables. Enguany l'organització de l'esdeveniment ha convocat un poeta que elabora la seva proposta cultural en una llengua que supera els espais geogràfics encotillats pels conceptes de nació o d'estat. Es tracta de la llengua auxiliar esperanto. En aquesta llengua s'expressa una cultura que és de tots i de tothom i que sovint és ignorada en els cenacles literaris. En aquest sentit, l'organització del Festival de Poesia de la Mediterrània ha fet una aposta valenta i ha sabut triar un poeta valuós que gaudeix d'un gran crèdit en medis on es conrea l'esperanto. Es tracta de

n'Abel Montagut, originari de la vila de Llardecans, comarca del Segrià, autor d'obra poètica i narrativa en llengües esperanto i catalana.

El cultiu de la llengua esperanto, com a llengua de cultura, no és estrany a Mallorca, fins i tot no és estrany haver sentit cantar poetes en esperanto dins el Teatre Principal de Ciutat, ja que durant el segle xx va haver-hi diverses manifestacions culturals expressades en aquesta llengua. Efectivament, l'any 1925, en el marc d'un congrés organitzat per la Federació Catalana d'Esperantistes juntament amb l'Esperantista Klubo Palma s'hi celebraren els XI Jocs Florals Internacionals. L'any 1927 un esdeveniment semblant va ocórrer a Sóller. Aquest fou organitzat per la Federació Catalana i el Grup Esperantista Sollieric i encara abans d'acabar-se el segle, el 1993, hi va haver uns altres jocs florals internacionals i en esperanto, que se celebraren a Alcúdia.

El 1909 se celebrà a Barcelona el V Congrés Universal d'esperanto, amb

Pàgina 10



CONSELL DE MALLORCA



SUKCESOJ KAJ ZORGOJ

La aprila lavango de aranĝoj organizita de KEA en Barcelono estas mult-aspekte atentinda kaj gratulinda. Ŝajne, kiel okazis fine de novembro kaj komence de decembro en Sabadell, KEA elektas la koncentradon de pluraj gravaj aranĝoj en unu loko en la daŭro de malmultaj tagoj. Tio celas pli grandan eĥon de la amaskomunikiloj same kiel la altiron de alilanda publiko, ĉar unu sola esperanto-aranĝo montriĝas ne tiel celtrafa por ambaŭ grupoj.

La rezulto en ambaŭ okazoj ŝajnas sufiĉe kontentigaj: la eĥo de la amaskomunikilo estis sukcesita, dum eble alilandanoj ĉi-aprile ne estis tiel multaj kiel esperite. Aliflanke, en ambaŭ okazoj la reago de la lokaj esperantistoj estis tre ĝojinda kaj superis la prognozojn: la plenpleneco de la urbodoma salono okaze de la solena memoraĵo pri la centjariĝo de la universala kongreso en Barcelono memorigas la prezenton de la libro pri la komenca esperanto-movado en Katalunio, verkita de Francesc Poblet, okazinta antaŭ kelkaj jaroj en la Nacia Historia Muzeo.

Malpli kontentiga en ambaŭ okazoj estis la partopreno de ne-esperantistoj. Same kiel en la elstaraj novembraj rondaj tabloj pri lingva diverseco venis malmulta ekstera publiko, oni esperis je pli da sukceso en tiu direkto en la du duoblaj folklor-muzikaj koncertoj de aprilo. Indas atente analizi tiun aspekton kaj provi plibonigi la rezultojn en venontaj okazoj. Solvo evidente malsimplas.

Atentidas ankaŭ la granda fortostreĉo postulata por la okazigo de diversaj grandaj aranĝoj en nur deko da tagoj: en aŭtuno ne temis pri la organizado de kongreso, sed preskaŭ du en du sinsekvaj semajnfinoj. Ĉi-printempe la sinsekvo de agadoj ankaŭ en deko da tagoj estis same elĉerpiga. La elektita vojo por atingi eĥon kaj sukceson estas tre postulema, kaj indas atenti, ĉu ni bone mezuras niajn fortojn, aŭ ĉu ni riskas tropostuli de aktivuloj, tiel ke post la fino de intensiva labormaratono ili eble dispeliĝos hejmen por longe ripozi, kiel ofte okazas ĉe naciaj asocioj post ekzemple la organizo de universala kongreso.

Hektor Alos i Font

En ĉi tiu numero kunlaboris: Darío Rodríguez, Éric Collignon, Ferriol Macip, Fransŭaz' Rochette, Josep Enric Peres i Blesa, Josep Franquesa, Lluís Aragay, Martí Guerrero, Mon Cardona, Víctor Solé, Xavier Margais

Kataluna Esperanto-Asocio:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Faksno: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2008: individua abonanta membro, 64 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; individua dumviva membro, 1280 eŭroj; kolektiva membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 001, Barcelona
kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Ferriol Macip i Bonet; kasisto: Àngels del Pozo Serrano; komitatoj: Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera, Víctor Solé.
Kontrola Komisiono: Núria Coll, Christian Pinard, Òscar Puig.

Kataluna Esperantisto:

Provizora ĉefredaktoro: Hèctor Alòs i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: joves@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/joves
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 002, Barcelona
kontonumero: 3025 0002 47 1433276794
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Aida Sunyol, Anna Raventós, Roger Sanjaume.

Impres a/Presita ĉe: Copisteria Garriga, Ronda Zamenhof, 98, Sabadell, (Vallès Occidental), tel. 93 727 25 55. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Fransŭaz' Rochette,
Kompanio Duoble Unu

PRINTEMPO EN BARCELONO: NE SVARMIS HOMOJ SED VARMIS LA ETOSO!

Kataluna Esperanto-Asocio organizis serion de du festvesperoj okaze de la centjara datreveno de la Universala Kongreso en Barcelono. La eventoj okazis en belega spektaklejo: Centre Artesà Tradicionàrius, loko dediĉata al tradiciaj muzikoj. Ĝi situas en tre agrabla kvartalo nomata Gràcia, eksa laborista kvartalo, kie nuntempe oni trovas multe da artistaj lokoj, butiketoj pri kinar-to, modo, trinkejoj ktp.

Ĉiuvespere estis unue koncerto kaj due folk-balo. La vespero komenciĝis je la kutima barcelona horo, t.e. la 22a, kaj finiĝis longtempe post noktomezo: Cindrulino estus perdinta sian kaleŝon!

La unuan vesperon, vendredon la 24an de aprilo, koncertis Jomo kaj nunaj Liberecanoj –Muriel, Pierre kaj Gérard–, kaj speciala gastino, Viera, kiu ludis bele du kanzonojn. Ne necesas prezenti la faman Jomon, ĉiam energiplenan, mi aldonas nur, ke muzikistoj estas altkvalitaj, sed ke pro tro da energio, animo laŭ mi iomete mankas al la koncerto... Poste, plenigitaj je tiu “Joma energio”, ni invadis la danclankon kaj ĝoje dancis laŭ la ĉiam agrabla muziko de Kaj Tiel Plu: naŭ muzikistoj, ĉiuj altkvalitaj, ludas fajnajn, kolorajn, varmajn kanzonojn kaj dancmelodiojn; sin sekvis polkoj, bureoj, cirkloj, valsoj ktp... Ni bele ŝvitis, kaj ridis, kiam, komencinte kiel virino en cirklo, oni fariĝas viro ekde la unua ciklo, pro spertomanko!

Je la dua matene, ek al ripozo, ĉar morgaŭ rekomenciĝos same, kun ni kiel unua parto! Gastigis nin Gemma kaj Xevi, kantisto/gitaristo de Kaj Tiel Plu, en urbo Mataró, 30 kilometrojn norde de la ĉefurbo, ĉe la marbordo. La mara proksimeco provizas la agrablan urbeton per freŝa, vigla aero: ŝajnas feria etoso al ni, kiuj loĝas en montara regiono. En la urbocentro estas multe da ŝu- kaj mod-butikoj sed ankaŭ ĉiaj varoj troveblas en malgrandaj butikoj, malsimile al Francio, kie tiaj vendejoj mul-



LUIS ARAGAY

La unuan vesperon koncertis Jomo kaj nunaj Liberecanoj



LUIS ARAGAY

Poste ni invadis la danclankon kaj ĝoje dancis laŭ la ĉiam agrabla muziko de Kaj Tiel Plu



MON CARDONA

Kaj jen alvenis la tiel atendita momento: NI KONCERTAS EN BARCELONO!



LUIS ARAGAY

Kapriolo estas duono de Kajto kaj du pliaj muzikistoj kiuj decidis fondi balgrupon

te suferas pro invado de bazaregoj en urbĉirkaŭaĵoj. Tiel, la urbocentraĵoj estas multe pli agrablaj en Katalunio. Ni provludis sur la teraso, sub aprila suno, lumema kaj ne tro varma; antaŭ ni estis aliaj terasoj (ĉiuj domegoj finiĝas per teraso ĉi tie) kaj mi imagis spektantojn sur ĉiu teraso, kiel en videoklipo de sudamerika rokbando! La provludo pro tio estis tre efika!

Reiro al Barcelono, en Centre Tradicionàrius, teo antaŭ sonprovo en belega

trinkejo: ŝultron ĉe ŝultra, la tri geklinoj penseme, silente, viŝis glasojn antaŭ mi: estis kiel filmbildo, teatraĵo.

Kaj jen alvenis la tiel atendita momento: NI KONCERTAS EN BARCELONO! Mi estis nervoza kaj timema... Mi ne kutimas ludi en tiel bonkvalitaj koncertejoj! La sonteknikistoj bone laboris kaj dum la koncerto mi ĝuis aŭdi mian voĉon, tiel klare!! Ĉu vere mi kantas tiel? Estas agrable aŭskulti min! Ramon tradukis katalunen niajn enkonduktojn

kaj eĉ la tutan fabelrakonton de Nasrudin. Sed jam tro rapide pasas tempo, estas la fino de nia parto, ni sukcese kantis “La rumba” de Barcelono, konkludante tiun rondiradon ĉirkaŭ Mediteraneo.

Post meritita biero mi kuniĝas kun la ŝvitantaj kaj kapriolantaj dancistoj, inter kiuj geKopotanoj, kiuj estas ankaŭ spertaj dancistoj. Sed kiu estas Kapriolo? Estas duono de Kajto kaj du pliaj muzikistoj. Marianta (akordiono, kanto) kaj Mariza (flutoj, kanto) decidis fondi balgrupon. La repertuaro entenas parte kanzonojn de Kajto, parte tradiciajn frisiajn melodiojn, kun esperantaj tekstoj. La du aliaj muzikistoj ludas kontrabason, gitaron kaj perkutilojn diversajn kaj originalajn. La rezulto estas bonega folkgrupo, kun kelkaj spicaj aldonajoj (per voĉoj aŭ muzikiloj). Mon Cardona gvidis la dancojn, kiam necesis, kaj tradukis la prezentadojn katalunen.

Fine, je la dua matene, ni kunkantis kanonon cirkle sur la planko.... Jam finiĝis la renkontiĝo. Laŭ pluraj partoprenantoj, ni devus ĉiujare organizi tiajn eventojn miksantajn folkmuzikon kaj esperanton! Kiu zorgos pri tio venontan jaron? Farri, KTP, tre bele organizis la ĉi-jaran eventon, kaj mi certas, ke estas multe da laboro... Dankon kaj gratulon al li!

Ĉar en nia regiono, Arpitanio, svarmas ankaŭ folkŝatantoj, mi proponas ĝemeligon inter ambaŭ esperanto-asocioj!

Dimanĉo, nia lasta kataluna tago, estis tre bone organizita de la sorto: pluvegis, kiam ni dormis kaj sunegis kiam ni vekigis! Orkestroj ludis sur la ĉefa placo ĝis la dua posttagmeze (kutima kataluna manĝohoro), homoj dancis sardanon: fajna plezuro por okuloj kaj oreloj. Post manĝeto ni promeneto sur marbordo, mi ne rezistis al la onda alvoko: kvankam la akvo malvarmetis, mi kuris kaj plongis en la energiplenajn ondojn. Post unuaj doloretoj pro malvarmo, mi ne kapablis eliri kaj plu plongis en ondojn, provante ne lasi min barakti per la fortika akvo. Nia kara Mediteraneo plenigis min je fortoj kaj sereneco. Se eblus sin bani post ĉiuj koncertoj en mara akvo!

Revenante hejmen trajne, ni laŭdis esperanton kaj muzikon, kiuj donas al ni eblecon viziti aliajn landojn. Sed realeco trafis nin en Port Bou: ne ĉiuj rajtas laŭvole translimiri: landlimaj policistoj diligente traserĉas “senlegitimitulojn”. Egaleca, homa, pacema kaj akceptema mondo ne ankoraŭ realiĝas en Eŭropo. Estas skribita en marmoro “Ĉiuj homoj egalas”, sed en la reala vivo, landestraroj aldonis “depende de kiu limflanko ili naskiĝis”. Ĝis revido, Barcelono! □

Ferriol Macip i Bonet

ESPERANTO-TAGOJ EN BARCELONO

En la kolektiva memoro de la barcelonanoj kuŝas la okazintaĵoj de antaŭ cent jaroj, nome la Tragika Semajno. En julio 1909 okazis en Barcelono popola ribelo, kies subpremado rezultis 78 mortintoj (75 civilaj kaj 3 militistaj), duonmilo da vunditoj, 112 bruligitaj konstruaĵoj (el kiuj 80 religiaj), kelkaj miloj da arestitoj, 175 kondamnitaj al ekzilo, 59 dumvivaj enkarcerigoj kaj 5 kondamnitaj al mortopuno, inter kiuj Francesc Ferrer i Guàrdia, fondinto de moderna pedagogia instruado, arestita survoje al la 5a Universala Kongreso de Esperanto.

En la kolektiva memoro de katalunoj esperanto ludas gravan rolon. Antaŭ cent jaroj esperanto estis idealo, kiu vekis aprobon kaj simpatian de konsiderinda parto de la loĝantaro. Katalunistoj, suverenistoj, laboristoj, sindikatoj, anarkiistoj, marksistoj, kleruloj kaj pluraj diverspecaj kolektivoj aliĝis al la esperantismo. La tragediaj tumultoj okazis en julio kaj, kvankam ili estis maloportunaj al la organizado de Universala Kongreso en la urbo, en septembro Barcelono plensukcese gastigis la 5an Universalan Kongreson de Esperanto. La okazigo de la tutmonda kongreso kaj la vizito de la D-ro Zamenhof al la kataluna ĉefurbo ne estis nur kunveno de esperantistoj el la tuta mondo, sed ankaŭ grava paĝo en la historio de Barcelono.

Okaze de tiel grava centjariĝo, Kataluna Esperanto-Asocio eldonis, en la kataluna lingvo kaj en esperanto, la libron de la historiisto Francesc Poblet i Feijoo *La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono. La firmigo de la esperanto-movado en la Kataluna Landaro*. Vicministro pri lingva politiko de la kataluna registaro verkis la antaŭparolon.

Memore al la okazintaĵoj, Kataluna Esperanto-Asocio organizis plurajn aranĝojn por kunfesti, kun la civitanaro, la eventon.

La 23an de aprilo, tagon de Sankta Georgo, dum la katalunia festo de la libro kaj la amo, esperantistoj starigis budon en ĉefa promenejo de Barcelono, la Rambla, kaj tiel kunlaboris al magia, festa, kultura kaj ama etoso



Carles Vela, estro de la koruso Santa Eulàlia, eldiras enkondukajn vortojn

de la tago. Krom proponi librojn pri lingva ekologio, interlingvistiko, lingvaj rajtoj kaj esperanto, la budo inaŭguris la printempajn esperanto-tagojn en Barcelono.

Centre Artesà Tradicionàrius (CAT) estas centro pri popolmuziko enhavanta, i.a. altnivelan muzikan teatron. Ĝi senĉese proponas diverspecajn festivalojn. La 24an kaj la 25an de aprilo, ĝi proponis "Festivalon de popolmuziko kaj esperanto en CAT" laŭ formato de po unu koncerto kaj unu balo tage. La 24an de aprilo koncertis Jomo kaj Liberecanoj kaj Kaj Tiel Plu dancigis la partoprenintojn. La 25an de aprilo la duopo Duoble Unu proponis belegan spektaklon vidan kaj muzikan laŭ muzikoj de Mediteraneo, kaj sekve Kapriol' dancigis danceman publikon. La alta kvalito de la festivalo surprizis la ĉeestantojn, la organizantojn kaj la amaskomunikilojn. Kvankam la nombro de partoprenantoj ne estis tre alta, la bona muziko koncerte kaj dance, igis la etoson amika, ĉarma, bela kaj emociiga.

Sekve de la festivalo, kaj por respondi eventualajn interesiĝojn dum la festivalo, la 27an,

En la kolektiva memoro de katalunoj esperanto ludas gravan rolon

Memore al la Universala Kongreso de 1909, Kataluna Esperanto-Asocio organizis plurajn aranĝojn por kunfesti la eventon

28an kaj 29an de aprilo Kataluna Esperanto-Junularo kunvenis en la trinkejo de la muzeo pri moderna arto. Kun la celo organizi debatojn pri lingva daŭripovo, KEJ okazigis informajn kunvenojn al interesiĝintoj pri esperanto, kaj movadanoj profitis la okazon laborkunveni.

En la nobla salono “de Cròniques” de la barcelona urbodomo estas 120 seĝoj, sed jaŭdon la 30an de aprilo oni devis aldoni plian kvindekon por akcepti ĉiujn partoprenantojn en la memora solenaĵo pri Universala Kongreso de 1909. Tie prelegis reprezentanto de la barcelona magistrato, Ramon Nicolau, la prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, Llibert Puig, kaj la vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Pedro Hernández; Josep Franquesa, komitatano de KEA en UEA legis salutmesaĝon de la prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, Probal Dasgupta. Koruso Santa Eulàlia kantis “La najtingalon”, tradukon de fama popolkanto aperinta en la Kataluna Antologio. Post la solenaĵo, manĝeto estis proponita en la gotika galerio de la nobla ĉefdomo de la urbo.

Vendredon la 1an de majo Kaj Tiel Plu okazigis balon en la gotika placo del Rei. La sono estis bonega, la dancemo de la publiko estis grandega kaj la partopreno estis multnombra. Ekde la 21:30a ĝis noktomezo, la kataluna folkbando senĉese dancigis per polkoj, bureoj, cirkloj, mazurkoj, valsos kaj pluraj aliaj popoldancoj.

Sabaton la 2an de majo oni fermis la esperanto-tagojn per rememoraĵo. La historiisto Dani Cortijo, fakulo pri historio de Barcelono, gvidis kvidekon da homoj tra la stratoj de la urbo laŭ la vivo de Barcelono en 1909 kaj sekvan- te la spurojn de du elstaraj kongresintoj kaj unu kongresonto, t.e. Joan Amades, Andreu Nin kaj Francesc Ferrer i Guàrdia (vidu notojn). La promenado finiĝis en la tombejo de Montjuïc, kie oni vizitis la tombon de Ferrer i Guàrdia kaj la amastombejon nomatan “Fossar de la Pedrera”, kie kuŝas internaciaj brigadistoj batalintaj kontraŭ la faŝismo dum la hispana milito kaj kvarmilo da persekutitoj murditaj de la frankismo.

Pluraj el la plej elstaraj amaskomunikiloj de la lando interesiĝis pri la festivalo. La muzikradio ICatFM elsendis tuthoran programon pri popolmuziko en esperanto kun la partopreno de Mon Cardona kaj Ferriol Macip, kie aŭskulteblis eroj de la lasta, KD de JoMo, Duoble Unu, Kajto kaj Kaj Tiel Plu. COM Ràdio informis pri la festivalo kaj intervjuis la sekretarion de KEA kadre de la posttagmezaj novaĵoj kaj proponoj por barcelonumi. Ràdio 4, kataluna branĉo de hispana ŝtata radio, elsendis duonhoran programon pri la festivalo kun intervenoj de Floreal Martorell kaj Ferriol Macip. La urba televida kanalo, Barcelona TV, informinte pri la 5a Universala Kongreso kaj la solenaĵo en la urbodomo, elsendis kvaronhoran intervjuon al la aktivulo de Kataluna Esperanto-Junularo, Roger Sanjaume, kadre de la vesperaj novaĵoj. Sanjaume reliefigis la rolon de esperantismo en la nuntempaj sociaj movadoj. □



LLUIS ARAGAY



LLUIS ARAGAY

La historiisto Dani Cortijo gvidis ekskurson tra la stratoj de Barcelono laŭ la vivo de 1909, sekvante la spurojn de Joan Amades, Andreu Nin kaj Francesc Ferrer i Guàrdia

Joan Amades (Barcelono 1890 – 1959) estis kataluna esperantisto, publicisto kaj folkloristo. Liaj verkoj pri folkloro kaj popoldanco igis lin nacia aŭtoritato pri kataluna folkloro. Esperantisto de 1907, li estis kunfondinto kaj prezidinto de Kataluna Esperantista Federacio, kunorganizinto de la Universala Kongreso en Barcelono. Eldonis milojn da diversaj, artaj esperantaj sigelmorkoj kun 243 malsamaj bildoj.

Andreu Nin (El Vendrell 1892 – Alcalá de Henares 1937) estis unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la revolucia marksismo en Katalunio. Li estis aktiva esperantisto junage en sia naskiĝurbo, kie li kunfondis grupon, instruis la lingvon kaj abunde propagandis en gazetoj. Li aparte elstaras pro sia graveco en la Komunisma Internacio kaj la Ruĝa Sindikata Internacio kaj vivis en Moskvo de 1921 ĝis 1930 kunlaborante kun Lenin kaj Trocki. Kunfondinto de POUM (Laborista Partio pri Marksisma Unuiĝo) lia morto estis daŭre mistera ĝis antaŭ nelonge, kiam esploroj konfirmis ĉies suspektojn: Nin estis kaptita, torturita kaj murdita laŭ ordono de Stalin. Krom lia politika agado, Nin famas kiel tradukisto de gravaj verkoj de la rusa literaturo al la kataluna lingvo.

Francesc Ferrer i Guàrdia (Alella 1859 – Barcelono 1909) estis kataluna instruisto kaj pedagogo, adepto de Libera Penso kaj fondinto de t.n. Moderna Lernejo, en kiu li edukis laboristajn geknabojn sen trudaj rimedoj, sen batado kaj preĝado, sen ŝtata kaj eklezia influoj. Pro tio kaj pro sia supozata rilato al anarkiismo, li estis komplete akuzita pri instigo de la revoluciaj tumultoj en Barcelono en 1909, konataj kiel la Tragika Semajno. Ferrer estis arestita survoje al la 5a Universalan Kongreson de Esperanto en Barcelono, kaj ekzekutita unu monaton poste.

DUOBLA SUKCESO EN MAJORKO

Abel Montagut partoprenis en la 11a Festivalo de Poezio de Mediteraneo, okazinta la pasintajn 3an kaj 4a de junio, reprezentante la literaturon en esperanto. Entute ĉi-jare estis prezentitaj dek lingvoj: angla, dana, esperanto, galega, hungara, itala, kastilia, kataluna, malta kaj slovena. En la tago de la inaŭguro, la ĵurnalo *Diario de Mallorca* publikigis longan opini-artikolon de nia samasocio Xavier Margais, kiun ni reproduktas en ĉi tiu numero de nia revuo. Fakte, la inkludo de esperanto vekis scivolemon kaj intereson de la amaskomunikiloj, kaj nia samasocio estis intervjuita en gazetoj, radioj kaj televido. La ĉeesto de esperanto estis atentigita en ĉiuj informoj, neniam malpozitive.

En la festivalo, Montagut legis ĉ. du paĝojn de *Poemo de Utnoa* kaj kvinoble pli aperis, en esperanto kaj la kataluna, en festivala libro.

Al tiu agado sekvos dudek-hora kurso en julio titolita “La internaciaj helplingvoj. Enkonduko al esperanto”, okazonta ene de la someraj universitataj kursoj de la Universitato de la Balearaj Insuloj. Gvidas la kurson d-ro Gabriel Bibiloni, instruisto pri socilingvistiko en organizanta universitato, kaj unu el la ĉefaj fakuloj ĉi-kampe en la Katalunaj Landoj, kaj instruas en ĝi niaj samasocioj Lluís de Yzaguirre kaj Xavier Margais.

La anoncitaj celoj de la kurso estis kvin, laŭ la kursprogramo: analizi la lingvajn problemojn aperantajn en la internaciaj rilatoj, koni la proponojn alternativajn al la trudo de naciaj lingvoj, kapabli historie enkadrigi la proponon de esperanto kiel internacia helplingvo, ekkoni la nuntempan valoron de esperanto kaj de la esperanto-movado, kaj esti kapabla kompreni facilajn tekstojn en esperanto kaj konstrui frazojn ebligantajn mallonge konversacii.

Kun tiuj celoj estas anoncitaj tri prelegoj kaj praktika kurso –kiu plenigos 12 el la 20 horoj de la kursaro– fare de kvar universitataj fakuloj: “La lingva diverseco de Eŭropo kaj la mondo”, de d-ro Gabriel Bibiloni, “La serĉo de neŭtrala lingvo”, fare de d-ro Lluís de Yzaguirre, “La esperanto-movado. Celoj, evoluoj, nuntempo. Historio de la esperanto-movado en la Balearaj insuloj”, fare de d-ro Xavier Margais, kaj “Enkonduko al esperanto”, fare de d-rino María José Álvarez Faedo.

NORD-KATALUNAJ BIOGRAFIOJ

La membroj de la esperanto-grupo en Prada de Conflent ĉi-jare okupiĝis pri la redaktado de mallongaj biografioj de nord-katalunaj esperanto-aktivuloj por la esperantlingva Vikipedio. Ĝis nun estas publikigitaj artikoloj pri Jean Baron, Thérèse Julia, Jean Julia, Frederic Cros, Étienne Coste, Robert Gendre, Raymond Goudin, Émile Bellsola kaj Víctor Fratot. Ne por la unua fojo la grupo entreprenas tian laboron, kiu helpas la praktikadon de esperanto, la pli bonan propran konon de sia ĉirkaŭo kaj historio kaj la disponigon de tiuj konoj al la cetera mondo. Antaŭ kelka tempo la tuta lernojararo estis dediĉita ekzemple al la verkado de artikoloj en esperanto pri la diversaj vilaĝoj de Conflent.

APRILA ESPERANTO-KAJ-SEMAJNO EN SABADELL

Por la dua fojo, dum la Librotago, la 23an de aprilo, Centro de Esperanto Sabadell forlasis sian kutiman lokiĝon en ŝparkasa ĝardeno por starigi la budon surstrataj kaj pli kerne de la promenataro. Tio signifis pli da interesitoj, pli da Tinĉjokolektantoj, pli da venditaj libroj, pli da disdonitaj flugfolioj ktp. Entute pli da esperanta videbleco.

Hazardo volis, ke tiujara Sant Jordi parte koincidis kun la Festo de la Diverseco (okazinta inter la 20a kaj la 25a de aprilo), en kiu ni partoprenas de antaŭ multaj jaroj. Tiujara okazigo kunigis 164 asociojn (asociojn de enmigrintoj, urbajn NROjn, lernejojn, politikajn asociojn ktp) sub devizo “senlaboreco, milito, malegaleco... alia mondo eblas”. CES repondecis pri redaktado de manifesto (kaj posta tradukado en esperanton, la rusan kaj la francan) kaj pri kunorganizado de “tastets del món” (“glutetoj el la mondo”), vendrede vespere, kie enmigrintoj prezentis kaj gustumigis tipajn pladojn samtempe ol ili diskonigis iom da kulturo el sia lando (libroj, kantoj, filmoj ktp). Ĉi-jare partoprenis niĝeraj, senegalaj, boliviaj, kolombia, argentina, venezuela, ekvadora, arabaj kaj tamaziĉtaj asocioj por ĝuo de niaj langaj papiloj, okuloj kaj oreloj.

Krom tio ni starigis nian kutiman budon sabate tuttage dum la ĉefa tago de la festo kaj organizis nian atelieron, kiun nesurprizinde ne partoprenis amaso da homoj

(du), sed kiel kutime, oni devas esperi, ke kvalito pli gravas ol kvanto.

Éric Collignon

ARABA KLASO EN CES

Antaŭ unu jaro kaj duono, areto da gekuraĝuloj (ses gelernantoj entute) komencis lerni la araban lingvon en Centro de Esperanto Sabadell. Kialoj partopreni estis diversaj: emo lerni tute malsimilan lingvon kaj alfabeton, emo vojaĝi al arabaj landoj, emo batali, je propra eta skalo, kontraŭtiutiomdisvastigita kontraŭ-araba racismo ktp. Fakte estas, ke post 18 monatoj, klaso ankoraŭ funkcias ĉiumerkrede sub la gvidado de Mohamed Chtaibat, respondeculo de la maroka asocio Anasiba de Torre Romeu, eksterurba kvartalo kun granda enmigrinta loĝantaro. La instruisto fakte ne nur instruas la lingvon, sed ankaŭ malkovrigas aliajn kulturon, vivfilozofion kaj religion.

La pasintan 30an de januaro, kelkaj lernantoj kaj la instruisto partoprenis en Alliance Française de Sabadell en la tago “poezioj kontraŭ la barbareco”, kiu celis protesti kontraŭ la agreso de Israelo en la Gaza-strio. Legita poemo estis “Ummi” (patrino), fama teksto de palestina poeto Mahmud Darwish, tre konata en la arabaj landoj pro muzikigo de la libana kantisto Marcel Khalife. Versiojn oni legis en la kataluna, araba, esperanto kaj franca.

Se estas aliaj arabemuloj pretaj ĵeti sin en la aventuron, ili estas bonvenaj, ĉar la instruisto tute pretas ekigi novan klason por komencantoj post la somero. Do ne hezitu kontakti nin, se la ideo plaĉas al vi.

Éric Collignon

FILMO SUBTITOLITA EN ESPERANTO

Tiu ĉi jaro 2009, Katalunio omaĝas Joan Amades okaze de 50a jaro de sia forpaso.

Kiam li estis juna, Amades lernis esperanton kaj aktive partoprenis en la movado. Li multe helpis la 5an Universalan Kongreson de la jaro 1909 en Barcelono. La jaron 1923 li estis elektita prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio.

Joan Amades, granda folkloristo traveturis multajn katalunajn vilaĝojn kompilante diraĵojn, priskribojn, morojn, kutimojn,

rakontojn, kantojn kaj dancojn. Li verkis dekojn da libroj: *Histories i llegendes de Barcelona* (en du volumoj), *Costumari Català* (en kvin volumoj kun entute 5000 paĝoj), *Les cent millors cançons populars*, *Les diades populars catalanes*, *Refranyer català comentat*, *Folklore de Catalunya* kaj aliajn. Li verkis ankaŭ *Katalunan Popolkanton*, antologion de katalunaj kantoj tradukitaj en esperanton.

La subtitolita filmo, prezentita en DVD, estas dividita en tri partoj. La unua parto de 30 minutoj enhavas biografion kaj folklorajn manifestaciojn. La dua parto de 20 minutoj enhavas antikvan fabelon. En la tria parto kvar-minuta la Ĥoro Heura de L'Hospitalet de Llobregat kantas en esperanto la popolkanton Montaroj de Kanigo. La aŭtoro kaj direktoro de la filmo estas Raül Contel.

Martí Guerrero i Cots

EN ESPERANTIO

La 17an de majo Ferriol Macip estis intervjuita de Pola Radio pri la eventoj okazintaj en Barcelono omaĝe al la 100-jara datreveno de la Universala Kongreso 1909. Dum la intervjuo la sekretario de KEA, ankaŭ membro de Kaj Tiel Plu, anoncis la aperon de tria disko de Kaj Tiel Plu por la fino de ĉi jaro.

La aprilaj aranĝoj meritis ankaŭ tutpaĝan artikolon de Ferriol Macip en la revuo *La Ondo de Esperanto*, la plej atenta gazeto pri la movadaj eventoj (kaj ne nur pri ili). Aliflanke la vigla retrevuo *Libera Folio*, kiu fariĝis elstara diskutejo pri la esperanto-movado, aperigis artikolon de Hektor Alos pri la du neesperantistaj aranĝoj en Majorko pritraktantaj esperanton.

dr / red

NOVA RETEJO DE CES

Dum la tuta lerneja jaro (de septembro ĝis nun), Núria Coll, ĉefa instruistino de nia klubo, instruis esperanton al Xènia Montero, juna lernantino kiu studas kaj fakas pri dezajno de retejo. Xènia, kiu ĵus gajnis trian premion de afiŝkonkurso de la kataluna registaro ("A la feina cap risc", t.e. "nenia risiko en la laborejo") okulumis nian malnovan retejon kaj logike terurigita pro ĝia nuna stato, afable proponis rekonstrui novan pli modernan kaj aktualan. Post monatoj da laboro, kiujn ni dankegas al ŝi, nia nova "reta bebo" oficiale naskiĝis la 20an de aprilo. Kiel vi povas konstati ĉe www.esperanto.cat/sabadell, ĝi dividiĝas en sekcioj Historio, Kursoj, Aktivavaĵoj, Libro, Fotoj, Kontaktoj ktp. kaj la fina celo estas, ke ĉiu CES-ano povu libere kaj senhelpe enmeti informojn en ĝin.

ec

Darío Rodríguez

INTERRETA RUBRIKO

Toño del Barrio kreis kurseton de esperanto en la socia retejo Twitter. Ĝi estas socia retejo, kie homoj sendas tre mallongajn mesaĝojn (ĝis 140 literoj), kvazaŭ mikroblogo. Li ekhavis la ideon uzi tiun rimedon por fari kurseton pri esperanto por hispanlingvanoj. Ĝi donus po unu lecioneton ĉiun tagon. La reta revuo *Libera Folio* aperigis artikolon pri ĉi nova kurso, kun informoj de la kreinto kaj diversaj interresaj opinioj, legebla ĉe www.liberafolio.org/2009/kvitero

La kurso ĉe Twitter videblas ĉe twitter.com/cursosesperanto

Pasintfebruare konata krimea esperantisto Paŭlo Moĵajev faris furoran prezenton de esperanto en populara ruslingva blogo Livejournal. Scipovantoj de la rusa povas sekvi la konsiderindan kvanton da demandoj kaj respondoj kiujn tiu prezento vekis ĉe tema.livejournal.com/275854.html?thread=119180942#t119180942

Pri tio informas ruslingva novaĝ-agentejo pri esperanto Esperanto-novosti ĉe www.e-novosti.info/blog/17.02.2009/2, ankaŭ ruslingve. Sed eblas uzi la tradukilon de Google el la rusa al la kataluna: translate.google.com, tial ke temas pri interesege diskuto.

Entute rus(lingv)aj esperantistoj montriĝas tre aktivaj kaj sukcesaj en interreto. En la ruslingva socia retejo VKontakte aliĝis pli ol 10 000 homoj al la grupo "Esperanto". Vidu ĉe vkontakte.ru/club48182

UEA decidis aktualiĝi uzante la eblecojn de filmo-retejoj.

Komence ĝi enretigis ok filmetojn pri la aprila Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo, al kio aldoniĝas nova serio aperonta periode kun la plej aktualaj temoj de UEA, kvazaŭ filma prezento de la konataj "Gazetaraj Komunikoj de UEA". La filmetoj spekteblas ĉe la jenaj adresoj: www.ipernity.com/doc/97850/home/video kaj www.youtube.com/UEAviva

Kvankam ne temas pri esperanta paĝo, niaj legantoj interesiĝantaj pri la Internacia Fonetika Alfabeto povas mem aŭdi la sonojn de la ĉefaj fonetikaj simboloj en jena paĝo: web.uvic.ca/ling/resources/phonlab/ipatut/index.html

La novelaro *Marvirinstrato*, de Tim Westover, estas senpage elŝutebla. Pluraj el la noveloj de tiu verko ricevis premion en la Belartaj Konkursoj de UEA. La retadreso estas: timwestover.com/marvirinstrato/?page_id=7

Ampleksa studo de Henri Masson pri la trudo de la angla lingvo en Francio kaj tutmonde legeblas ĉe la adreso: www.esperanto-sat.info/article1391.html

José Rodríguez kreis blogon, per kiu eblas spekti plurajn filmetojn subtitolitajn en esperanto: subtekste.blogspot.com

Aperis nova reta scienca revuo en esperanto. *Teleskopo* estas scienca revuo aperanta surrete por publikigi internacilingve artikolojn pri diversaj sciencaj fakoj, kiuj povas esti elŝutataj senpage el jena adreso en PDF-formato (individuaĵ artikoloj aŭ la tuta revuo): www.teleskopo.com/unuaeldono.htm □

ALTERNATIVA FOIRO EN VALENCIO

La pasintajn 5an, 6an kaj 7an de junio, kiel kutime de antaŭ kelkaj jaroj, valenciaj esperantistoj starigis budon en la alternativa foiro de Valencio. Ĉi-jare deĵoris ankaŭ volontuloj venintaj el princlando Katalunio. Tiu fakto kontribuis al pli vasta kvanto da proponaĵoj; ĉefe broŝuroj, flugfolioj kaj libroj pri lingva ekologio kaj lingvaj rajtoj, krome pli granda homa forto permesis esperantistojn samtempe deĵori, intertrakti aliajn kolektivojn, kaj okazigi prelego-debaton.

La alternativa foiro enhavas budojn starigitajn de diversaj anaroj, tie troveblas artaĵoj, ekologiaj produktoj kaj plej diversaj materialoj (T-ĉemizoj, gluaĵoj, informiloj ktp.) de sociaj kolektivoj en agrabla etoso, kiu permesas interkonatiĝi kaj paroli kun diversaj deĵorantoj pri ties idearoj kaj agado, disvastigi kaj samtempe lerni, kaj informiĝi pri diversaj problemoj de la urbo, de la lando, de la ŝtato, de la mondo...

La foiro ĉefe reliefigas ĉion rilate al alternativa edukado, memagado, natura nutrado, ekologio, kooperativoj, daŭripova energio, alternativaj amaskomunikiloj, kiel liberaj radioj kaj alternativaj informiloj, kaj okupitaj sociaj centroj.

Krom budoj kaj trinkejo, en la foirejo estas loko por koncertoj kaj du tendoj, kie oni okazigas prelegojn. Tiel do, krom amikiĝi kaj intertrakti kun diversaj aliaj sociaj anaroj, esperantistoj ankaŭ okazigis rondo-tablon pri lingva daŭripovo. En la debato, oni celis rimarkigi la gravecon labori por la lingva diverseco en la 21a jarcento, rimarkante la kvanton da lingvoj en grava risko malaperi, i.a. la kataluna en Valencilando.

Kiel kutime, la mona profito estis ege malalta, sed tamen, la socia gajno estis pleje sukcesa.

fm

PLENA VERKARO DE LIDJA ZAMENHOF

En junio aperis ĉe la eldonejo de Flandra Esperanto-Ligo la plena originala verkaro de Lidja Zamenhof *Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj*. Ĝin kompilis i.a. la nord-kataluna historiisto de la esperanto-movado Jean Amoureux. Lidja Zamenhof estis la plej juna filino de



En la alternativa foiro de Valencio

L. L. Zamenhof kaj samtempe tiu, kiu plej multe aktivis en la esperanto-movado. Ŝia engaĝiĝo igis ŝin fariĝi Cseh-instruisto kaj itinere instrui esperanton en diversaj landoj, i.a. en Nord-Katalunio. Ŝi ankaŭ tradukis al esperanto, i.a. el la pola lingvo la romanon *Quo Vadis?* de Henryk Sienkiewicz, kaj tre aktivis ankaŭ por bahaismo. Dum la nazia okupacio de Pollando, ŝi estis enfermita en la geto de Varsovio kaj poste veturigita al la ekstermejo de Treblinka, kie ŝi estis mortigita. Biografio pri ŝi estis tradukita el la angla lingvo en esperanton kaj publikigita de la sama eldonejo en la pasinta jaro.

LINGVOKONO KIEL ŜANC-EGALIGILO

La 8an de majo nia samasocio Ferriol Macip gvidis atelieron en Arano pri "La instruado de la lingvo kiel vojo al la egaleco de ŝancoj". La celo estas konsciigi pri la uzado de la loka lingvo en la socia vivo. La origina ateliero en kaj pri la kataluna lingvo estas farata de la asocio Tallers per la Llengua, kaj jam atingis pli ol 200 prezentojn en sindikatoj, lernejoj, asocioj k.a. de post sia starto en 2005. La okcitana adapto por Arano, lingva kaj socilingva, estas farita

de Ferriol Macip kun la helpo de Aitor Carrera, el la Universitato de Lejdo.

KAJ TIEL PLU EN OKCITANIO

Kaj Tiel Plu koncertos en Pau dimanĉon la 12an de oktobro en la 64a kongreso de SAT amikaro, en altnivela arta programo. Okaze de okcitan-kultura semajno, kiu en tiuj tagoj okazos en la ĉefurbo de Bearn, kaj de manifestacio por la okcitana lingvo, la koncerto de Kaj Tiel Plu kunigos en la teatro Sant Loïs de Pau, esperantan kaj okcitanlingvan publikon.

DOKTORIĜO

La 29an de junio nia samasocio Montserrat Franquesa sukcese defendis sian doktoriĝan tezon pri "Grekaj kaj latinaj klasikuloj en la kataluna: la tradukoj de la Fondaĵo Bernat Metge" ĉe la Fakultato pri Tradukado kaj Interpretado de la Aŭtonoma Universitato. Montserrat Franquesa, mezlerneja instruistino pri la germana lingvo, estas ankaŭ tradukisto de pluraj verkoj el la moderna greka literaturo kaj kunlaboras kun la Fondaĵo Bernat Metge.

Ve de la portada

presència del seu creador, el metge polonès de religió jueva Llàtzer Zamenhof. Els organitzadors del congrés van aportar a l'aventura internacionalista un costum genuí del país: la celebració d'uns jocs florals internacionals. L'esdeveniment havia de servir per a donar a conèixer internacionalment aspectes de la cultura catalana i, per altra banda, facilitar la creació literària en la llengua esperanto. Precisament en aquest esdeveniment un jove poeta català va guanyar un premi: Carles Ribà. Aquesta celebració tornà costum i cada congrés que realitzaven els esperantistes catalans s'acompanyava d'uns jocs florals en llengua internacional, on es premiava poesia i narració originària i també traducció. Aquesta feina va tenir un capítol apart, es tracta de la publicació d'una antologia de la literatura catalana. Efectivament, *Kataluna Antologio* fou editada l'any 1925 i reeditada el 1931. L'obra mostrava a la collectivitat esperantista o esperantera –en expressió d'en Biel Mesquida– d'arreu del món les particularitats i la riquesa de la nostra cultura i on sobresortien autors illencs com Ramon Llull, Costa i Llobera, Joan Alcover, Miquel dels Sants Oliver, Gabriel Alomar, Llorenç Riber com també l'obra d'autors del Principat traduïts per mallorquins.

A Mallorca el primer poeta en esperanto fou el mestre Josep Rosselló-Ordinas, qui va obtenir múltiples premis en els Jocs Florals Internacionals. Fou especialment lloat per les traduccions de poetes llavors actuals com Ignasi Iglésias, o d'autors clàssics com Horaci

o Gai Valeri Catul, i també va obtenir premis per obra creada originalment en esperanto. La nòmina de poetes mallorquins que conreen aquesta llengua no s'exhaureix amb el mestre Joan Rosselló, així Narcís Bofill va traduir peces teatrals, i per tal de no fer gaire pesada aquesta llista només citarem Estanislau Pellicer, qui va merèixer l'atenció dels esperantistes per les traduccions i adaptacions que féu d'obra d'autors com Apelles Mestres, Joaquim Ruyra, Joan Maragall o Víctor Català. Mentrestant eren poetes d'altres àrees del domini lingüístic català els que adaptaven a l'esperanto autors illencs, tant és així que fins i tot La Balanguera, l'obra de Joan Alcover i del mestre Amadeu Vives, està traduïda a l'esperanto ja des d'abans de la guerra que va liquidar la II República.

Enguany, en celebrar-se l'onzè Festival de Poesia de la Mediterrània –curiosament els Jocs Florals Internacionals que se celebren a Palma i al Teatre Principal també foren l'onzena convocatòria–, he tingut l'oportunitat d'escoltar la llengua esperanto cantada per un dels seus poetes més destacats, Abel Montagut. Treballador incansable, compta amb un ja dilatat treball original en esperanto. Citarem *Poemo de Utnoa, Karnavale (maskita rakonto)* i *La enigmo de l'ar@neo*, editats a Viena (Àustria) els anys 1993, 1997 i 2003 respectivament, traduïts al català pel mateix autor i editats a Lleida per Pagès editors, i la novel·la juvenil *El manuscrit de Jules Verne*, originàriament escrita en català, editada el 2003 per l'editorial Barcanova de Barcelona. La seva obra poètica s'enfonsa en els mites clàssics, com és el diluvi i la posterior salvació d'uns homes (no parlem de gènere) triats. La seva poesia, els seus milers de versos, són musicalment sempre harmònics i van més enllà de les pautes formals.

De manera que la trobada poètica que s'ha celebrat la primera setmana de juny ha tingut la virtut de posar-nos en contacte amb llengües que habitualment no tenim oportunitat de sentir en companyia d'altres que disposen d'un fort aparell propagandístic. Però totes elles estaran igualades en un aspecte: tota llengua ha de tenir poetes que l'estimin i la treballin oralment o per escrit, que la sacsegin i que la modelin, si volen que la llengua sigui, romanguí, que no desaparegui.

Xavier Margais

Tota llengua ha de tenir poetes que l'estimin i la treballin oralment o per escrit, que la sacsegin i que la modelin



CONSELL D'INFORMACIÓ DE MALLORCA

Aquest article és una actualització de l'aparegut el 3 de juny al Diari de Mallorca.

Hèctor Alòs i Font

L'ARTIFICIALITAT DE LES LLENGÜES: ESTANDARDITZACIÓ I PLANIFICACIÓ

La terminologia és essencial per al desenvolupament de les diferents disciplines científiques i, en particular, en les ciències socials. El simple fet d'establir un terme fa que s'aïlli un concepte –a vegades no aparent fins llavors– i, consegüentment, en faciliti l'estudi. Però el terme triat resulta també essencial: pot tenir connotacions que o bé estableixin paral·lismes interessants amb altres termes o altres disciplines, o bé, al contrari, resultin confusoriaris i dificultin tant la investigació com l'explicació del fet. Així, a l'esperanto se l'acostuma a anomenar *llengua artificial* (terme emprat per primera vegada per Paul el 1880), en comptes de les formes més correctes *llengua construïda* (terme encunyat per Jespersen el 1928) o *llengua planificada* (terme creat per Wüster el 1931). El terme *llengua artificial* remet a una realitat habitualment ignorada per al lingüista, mentre que *llengua construïda* o *llengua planificada* remet a parcel·les conegudes de la lingüística: a l'enginyeria lingüística i a la sociolingüística –i, en particular, a la planificació lingüística–, respectivament. Segons aquesta visió la generació d'una llengua planificada tindria un paral·lisme amb la creació d'una llengua estàndard, de manera que guardaria una relació quantitativa i no qualitativa amb altres processos de normativització. Al mateix temps, la socialització de l'esperanto tampoc no és un fet únic, sinó que manté paral·lismes evidents amb el renaixement de l'hebreu,¹ i actualment altres llengües –com el còrnic o el manx– també estan en procés de recuperació després d'haver deixat de parlar-se. També els processos de socialització –o normalització lingüística– s'estudien en el marc de la planificació lingüística.

Justament, ens plantegem ací discutir la relació entre llengües planificades i llengües no planificades, i particularment entre llengües planificades i llengües normalitzades. Adonar-nos-en ens pot ajudar a comprendre millor els fenòmens lingüístics: l'estudi de les llengües planificades dóna una perspectiva poc habitual a l'estudi de les llengües i, per això, pot facilitar-ne la millor comprensió de determinats elements.

GRAUS DE PLANIFICACIÓ LINGÜÍSTICA

Abans de tot, fixem què entenem ben bé per *llengua planificada*. La definició del *Diccionari de Sociolingüística* de Ruiz *et al.* diu: “Llengua elaborada racionalment en major o menor grau o derivada d'altres llengües mitjançant la simplificació amb l'objectiu de ser usada en la comunicació internacional o intergrupala” (Ruiz *et al.*, 2001, 174). La definició ens recorda la codificació d'una varietat estàndard d'una llengua, si no és que el mètode bàsic emprat és “la simplificació” i, sobretot, que l'objectiu és el de ser “usada en la comunicació internacional”. De fet, el segon element no sembla fonamentalment diferent, donat que sovint l'elaboració de llengües estàndards també es fa, a vegades, per tal de facilitar la comunicació entre parlants de diferents varietats d'una llengua.

Això ens fa ja, de bon començament, qüestionar el fet de considerar les llengües planificades com a radicalment diferents de la resta de

Les llengües artificials són també més o menys naturals, les llengües naturals són també més o menys artificials

El filipino està construït sobre la base de diferents llengües de les Filipines

llengües humanes. Ja Schuchardt ho indicava el 1921: “les llengües artificials són també més o menys naturals, les llengües naturals són també més o menys artificials” (Schuchardt, 1976, 375; citat en Liu, 2001, 137). Justament, la idea de grau de naturalitat i artificialitat és la que subratllen la majoria dels investigadors. Schubert, per exemple, considera que “no hi ha distinció entre llengües naturals i artificials, sinó més aviat una escala entre els dos pols «artificial» i «natural» o «conscientment» i «inconscientment desenvolupat»” (Schubert, 1989a, 10). De la mateixa manera, Barandovská-Frank cita la següent classificació de les llengües elaborada per Svadost, segons la qual “en principi totes les llengües són artificials, només es distingeixen pel grau d’artificialitat”:

1. *Llengües que no tenen sistema d’escriptura: llengües d’una comunitat de parlants, de llengües nacionals² àgrafes, llengües històriques o dialectes abans de ser normativitzats.*

2. *Llengües normativitzades: les llengües nacionals, literàries.*

3. *Projectes de llengües internacionals encara no utilitzades (només experimentalment): llengües construïdes sobre la base de les experiències lingüístiques de la humanitat, amb el material de llengües històriques (llengües a posteriori).*

4. *Projectes construïts sense considerar les experiències lingüístiques de la humanitat, sobre la base d’una classificació filosòfica de les idees i d’un conjunt de símbols alfabètics (llengües a priori).*

5. *Sistemes que no poden ni tan sols experimentalment funcionar de forma oral: interllengües entre màquines, codis matemàtics, cibernètics, en general tots els codis.* (Barandovská-Frank, 1995, 47)

Aquesta classificació en cinc grups, però, pot donar la sensació que potser hi ha diferents categories de llengües ben segmentades segons diferents graus de planificació. Sakaguchi rebut aquesta suposició en distingir quinze nivells en l’eix “espontaneïtat versus estandardització”:

Relíquies lingüístiques, dialectes, vernacles (llengües d’una comunitat), llengües nacionals normativitzades (p. ex. l’alemany, l’hongarès o el polonès escrits), llengües bàsiques (mínimes; p. ex. el basic english,

el francès fonamental, el grunddeutsch), llengües clàssiques (p. ex. el llatí o el sànscrit), llengües franques, pidgins, llengües criolles, llengües naturalistes a posteriori (p. ex. l’occidental, la interlingua), llengües racionalistes a posteriori (p. ex. l’ital, el neo), llengües clàssiques simplificades (p. ex. el latino sine flexione), llengües nacionals simplificades (les anomenades “llengües reformades”, p. ex. el wede), llengües formals (p. ex. l’algol, el cobol), llengües a priori. (Sakaguchi, 1998, 347; citat en Liu, 2001, 137-138)

De fet, veiem com podem anar distingint més i més, per exemple, en el grup “llengües nacionals normativitzades” si comparem la normativa francesa –fixada, en principi, per l’Académie Française– i l’anglesa –la qual no té un ens regulador determinat–; o bé si distingim entre “llengües per elaboració” o “llengües per distància”; o bé si es tracta d’estàndards unitaris o composicionals; o bé si analitzem la permissibilitat de l’estàndard –o, més aviat, pseudoestàndard– amb relació a diferents varietats dialectals (polimorfisme), etc.³ Trobem, doncs, un autèntic continu de casos entre espontaneïtat i elaboració.

EL PROCÉS D’ESTANDARDITZACIÓ D’UNA LLENGUA NACIONAL

Tanmateix, per a acceptar que només hi ha una diferència de grau en una llengua nacional estandarditzada i la d’una planificada, ens convé comparar amb més deteniment els dos processos que creen l’una i l’altra.

Eingar Haugen va proposar el 1983 un model que ha esdevingut de referència sobre la formació d’una llengua estàndard, segons el qual aquest es fa en quatre etapes:⁴

1. Selecció
2. Codificació
3. Extensió social
4. Elaboració

La selecció consisteix en la tria d’una o més varietats-base geogràfiques per a l’elaboració de l’estàndard. Així, Hobsbawen esmenta:

Les històries de gairebé qualsevol llengua europea insisteixen en aquesta base regional: el búlgar literari està basat en el dialecte

te búlgar occidental; l’ucraïnès literari, en els seus dialectes meridionals; l’hongarès literari emergeix en el segle XVI combinant diferents dialectes; el letó literari està basat en el central de tres variants; el lituà en una de dues, etcètera. (Hobsbawen, 1992, 54)

La tria de les varietats-base no és, en absolut, una qüestió secundària, sinó que pot ser motiu de controvèrsia i dificultar l’èxit del projecte d’estandardització, com en el cas de l’eslovac:

Bernolák va escollir un dialecte com a base del seu intent d’eslovac literari al voltant de 1790, el qual no va reeixir a consolidar-se, però unes dècades després L’udovít Štúr va escollir una altra base, que es va demostrar més viable. (Hobsbawen, 1992, 55)

No sempre l’estàndard es nodreix d’una única varietat-base central, sinó que pot comportar l’amalgama de diferents varietats en proporcions més o menys grans, com especialment s’esdevé en els anomenats *estàndards composicionals*. Fins i tot, les varietats-base poden pertànyer a llengües diferents, com en el cas del *filipino*, llengua oficial de les Filipines, construït “sobre la base del tagàlog complementada amb elements [d’] altres llengües del país” (Boix i Vila, 1998, 297).⁵ Per altra banda, cal remarcar que la tria de varietats no és només la de variants geogràfiques, sinó també de socials: l’expressió “l’anglès de la reina” per a referir-se a l’anglès modèlic resulta una expressió prou significativa d’aquest fet.

